

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## Kaŝema amo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Super arboj kaj greno  
Ĝis la hela bril' -  
Ĉu eblas diveno  
Per pensa flugil' ?  
La pensoj svingadas,  
La nokto mutadas,  
Liberas pensad'.

Divenas ĝin iu.  
Ŝin amas mi nur.  
Maldormas neniu  
Ĉe l' arba susur'.  
La nuboj flugadas,  
La amo mutadas,  
Similas al nokt'.<sup>2</sup>

*Traduko de la Germana poemo "Verschwiegene Liebe" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-038-1 / Arg-726-1466 (2012-12-27 14:18:26)*

---

<sup>2</sup>aŭ:  
Samkiel la nokt'.